bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2008 (182) Únor/februaro 2008

Z obsahu – el la enhavo:

La Internacia Jaro de Lingvoj 2
Saluto de Kurisu Kei 5
Jiří Karen: Se eble mi ne revenus 6
Jiří Karen Sub libera ĉielo 8
Zdenka Bergrová: Párnice 9
Zdenka Bergrová: Solstico 12
Karel Havlíček Borovský: Epigramoj 13
Jaroslav Seifert: Jarní den 14
Čestmír Vidman: Nikso 15
Čestmír Vidman: Ĉielo – infero – paradiz´ 15
Josef Fousek: Kredo 16
Miroslav Malovec: Ĉu ni havas strategion? 17
Kamila Bártlová-Lampířová / Jaroslav Krolupper: Úvaha filosofická 21

- - - -

La jaro 2008 – la Internacia Jaro de Lingvoj

En la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ro Koïchiro Matsuura pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008, estas dirite:

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj.

La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktor opor antaŭeniri al daŭropova evoluto kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka sferoj.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de Edukado por Ĉiuj kaj la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC) aprobitajn de Unuiĝintaj Nacioj en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato (JEC 1), dum kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo ili estas ankaŭ nepraj por atingi universalan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al naturmedia pluteneblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikce en la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco de Unesko kaj ĝia Agoplano (2001), la Konvencio por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo kaj la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimiĝoj (2005).

Rok 2008 – Mezinárodní rok jazyků

V poselství generálního ředitele UNESCO pana Koičira Matsuury o oslavách Mezinárodního roku jazyků v roce 2008 je řečeno:

Rok 2008 byl prohlášen Mezinárodním rokem jazyků Valným shromážděním OSN. Organizace UNESCO, které byla svěřena koordinace oslav, je připravena ujmout se svého řídícího úkolu.

Organizace si plně uvědomuje rozhodující význam jazyků v řadě výzev, kterým lidstvo bude muset čelit v následujících desetiletích.

Jazyky jsou vskutku nezbytné pro identitu lidských skupin i jednotlivců a pro jejich mírové soužití. Jsou strategickým faktorem, který umožňuje trvalý vývoj a harmonický vztah mezi úrovní celosvětovou a lokální.

Jazyky mají základní význam k dosažení šesti cílů Výchovy pro všechny a Rozvojových cílů tisíciletí (RCT) přijatých OSN v roce 2000.

Jako faktor společenské integrace hrají jazyky strategickou roli při odstraňování největší bídy a hladu (RCT 1), jako sloupy alfabetizace a učení se schopnostem potřebným pro život jsou také nutné k dosažení základního vzdělání (RCT 2). Boj proti HIV/AIDS, malárii a dalším nemocem (RCT 6) musí používat jazyky dotyčných skupin, aby se pokyny neminuly účinkem, a uchování lokálních a domorodých vědomostí a zručností v jejich přirozeném prostředí (RCT 7) je také vázáno na lokální a domorodé jazyky.

Navíc, kulturní různost je důvěrně svázána s jazykovou růzností, jak je uvedeno ve Všeobecné deklaraci o Kulturní různosti UNESCO a v plánu práce (2001), v Konvenci pro uchovávání duševního kulturního dědictví a v Konvenci o ochraně a rozvoji různosti kulturních výrazů (2005).

Tamen en la daŭro de kelkaj generacioj pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj interreto, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj – malgraŭ tio, ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon – forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitiko ebliganta al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, precipe de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivo.

Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la interreto aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la ekonomio, inter la lingvoj kaj socioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo „lingvoj gravas!“ estu diskonigata ĉie.

Tiukuntekste, la 21-a de februaro kiel dato de la naŭa Internacia Tago de la Gepatra Lingvo havos elstaran signifon kaj estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon sur la nacia, regiona kaj internacia niveluj, pri la graveco de la lingva diverseco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la interreto kaj komerco.

La Internacia Jaro de Lingvoj 2008 alportos unikan kancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj celoj.

Přesto v průběhu několika generací více než 50% ze 7 000 jazyků světa může zaniknout. Nyní je ve školách a na internetu používána méně než čtvrtina z nich, a většina jen okrajově. Tisíce jazyků – navzdory tomu, že každý z nich je ovládán lidskou skupinou, která jím každodenně mluví – chybějí ve školském systému, v komunikačních médiích, ve vydavatelském průmyslu a všeobecně ve veřejné sféře.

Je nejvyšší čas jednat. Jak? Povzbuzením a zpracováním jazykové politiky, která umožní každé jazykové komunitě používat svůj mateřský jazyk co možná nejčastěji a v nejširším rozsahu, také ve výchově souběžně s ovládnutím některého národního, regionálního nebo mezinárodního jazyka. Také povzbudit mluvčí vládnoucích jazyků, aby se naučili další národní nebo regionální a jeden nebo dva jazyky mezinárodní. Pouze, když bude mnohojazyčnost plně akceptována, budou moci všechny jazyky najít své místo v globalizujícím se světě.

Proto UNESCO vyzývá vlády, orgány OSN, civilní společenské organizace, výchovné instituce, profesionální svazy a další zainteresované, aby podnítily úctu, rozvoj a ochranu všech jazyků, zvláště těch ohrožených, ve všech situacích individuálního a kolektivního života.

A to buď iniciativami na výchovném poli, v internetu a v prostředí vzdělanců; nebo projekty pro záchranu ohrožených jazyků nebo podporou jazyků jako nástrojů společenské integrace, nebo zkoumáním vztahu mezi jazyky a ekonomikou, mezi jazyky a znalostmi domorodců nebo mezi jazyky a tvůrčí činností. Vždy je třeba přitom dbát, aby se všude šířilo heslo „jazyky jsou důležité!“

V souvislosti s tím bude 21. únor – jako datum devátého Mezinárodního dne mateřského jazyka – mít mimořádný význam a bude to vhodný termín pro uvedení iniciativ směřujících k rozvoji jazyků. Naším společným cílem je dosáhnout uznání na národní, regionální a mezinárodní úrovni o důležitosti jazykové různosti a vícejazyčnosti ve výchovném, administrativním a právním systému, v kulturních vyjádřeních a sdělovacích prostředcích, v internetu a obchodu.

Mezinárodní rok jazyků 2008 přinese unikátní šanci učinit rozhodný krok vpřed k dosažení těchto cílů. *(český překlad M. Malovec)*

Rok 2008 byl Valným shromážděním OSN prohlášen Mezinárodním rokem jazyků.

Tato skutečnost je obzvláště významná pro esperantisty, protože právě před sto lety – v roce 1908 byl založen Světový svaz esperantistů – Universala Esperanto-Asocio (UEA). Z tohoto důvodu můžeme rok 2008 považovat nejen za Mezinárodní rok jazyků, nýbrž také zcela oprávněně za Mezinárodní rok esperanta.

Při této příležitosti skupina polských představitelů v Evropské unii podala návrh, aby letošní Nobelova cena za mír byla udělena organizaci Universala Esperanto-Asocio v Rotterdamu, za trvalé úsilí a celkový přínos esperantistů celosvětovému dorozumění mezi národy.

Bez ohledu na tuto skutečnosti podal esperantský PEN-klub návrh Švédské královské akademii věd, aby Nobelova cena za literaturu byla udělena významné esperantské spisovatelce paní Marjorii Boultonové z Velké Británice. Paní Boultonová je autorkou řady děl nejen v esperantu, ale i v angličtině.

U příležitosti stého výročí UEA se bude letošní 93. světový kongres esperanta konat ve dnech 19. až 26. července 2008 v Rotterdamu, přičemž hlavním tématem jednání kongresu bude „100 let UEA a jazyky – poklad lidstva“.

Příští už 94. světový kongres esperanta se bude konat v roce 2009 v polském Bialystoku, rodišti tvůrce esperanta Ludvíka Lazara Zamenhofa, u příležitosti 150. Výročí jeho narození. Vedení města a především starosta města Bialystoku již podnikají kroky k důstojné oslavě svého rodáka a jeho díla, mezinárodního jazyka esperanta.

La jaro 2008 estis de Ĝenerala Asembleo de UNO proklamita La Internacia Jaro de Lingvoj.

Tiu ĉi fakto estas aparte multsignifa por esperantistoj, ĉar ĝuste antaŭ cent jaroj – en la jaro 1908, estis fondita Universala Esperanto-Asocio (UEA). Pro tiu ĉi kialo ni povas la jaron 2008 konsideri ne nur kiel la Internacia Jaro de Lingvoj, sed ankaŭ tute laŭrajte kiel la Internaci Jaro de Esperanto.

Ĉeokaze grupo de polaj reprezentantoj en la Eŭropa Unio faris proponon, ke la ĉi-jara Nobel-pacpremio estu atribuita al la organizaĵo Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, pro la daŭra penado kaj entuta kontribuo de esperantisto jal la tutmonda interkompreniĝo inter nacioj.

Sen konsidero al tio la Esperanta PEN-klubo proponis al la Sveda reĝa akademio de sciencoj, ke la Nobel-premio por literaturo estu atribuita al la elstara Esperanta verkistino sinjorino Marjorie Boulton el Britio. Sinjorino Boulton estas aŭtoro de vico da verkoj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla.

Okaze de la centa datreveno de UEA la nunjara 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 19-a ĝis 26-a de julio 2008 en Roterdamo, kun la ĉefa temo de la kongreso „100 jaroj de
UEA kaj la lingvoj – la trezoro de la homaro“.

La venonta jam 94-a UK de Esperanto okazos en la jaro 2009 en la pola Bjalistoko, la naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto Ludoviko Lazaro Zamenhof, okaze de la 150-a jubileo de lia naskiĝo. La urbestraro kaj precipe la urbestro de Bjalistoko jam entreprenas agojn por digna glorigo de sia samurbano kaj de lia verko, la Internacia Lingvo Esperanto.



Saluto de KURISKU Kei en la inaŭguro de la Universala Kongreso en Jokohamo

Bonvenon al Japanio, karaj gesamideanoj, gekamaradoj kaj geamikoj el la tuta mondo!

Mi, KURISU Kei el Japanio, nun havas grandan honoron kaj pleuron saluti vin kiel la dojeno de UEA, ĉar jam 97-jara mi ankoraŭ vigle agadas verkante kaj prelegáte ne nur japane, sed ankaŭ esperante. Mi ŝatus ĉi-okaze eldiri kelkajn vortojn pri tio, kion mi nun rigardas aktuala en la tutmonda Esperanto-movado, anstataŭ fari rutinan saluton.

Jen estas la esperanta traduko de „Resurekto“, la mondfama romano de Lev Tolstoj. En kom da ekzempleroj ĝi eldoniĝis, vi pensas? Ne miru, ke nur en Vincent. Vi, esperantistoj ĝenerale, certe ne estas nelegemaj; multaj e lvi kredeble tralegis tiun romanon siatempe, sed en la traduko de sia nacia lingvo. Ĉi tio estas la fenomeno ne nur ĉe „Resurekto“, sed ankaŭ la komuna fenomeno ĉe la esperantaj verkoj literaturaj ĝenerale. Bedaŭrinde la esperantistoj ĝenerale ne tre aĉetas esperantajn verkojn. Jen kial niaj esperantaj eldonejoj hezitas eldoni ilin, sekve kial multaj el la ĉefverkoj de la mondliteraturo, kiel ekzemple „David Copperfield“ el Anglio, „Moby Dick“ el Usono, „La Mizeruloj“ kaj „Jean Cristophe“ el Francio, „Milito kaj paco“ kaj „Fratoj Karamazov“ el Rusio kaj „Rakonto de Genzi“, plej malnova romano en la tuta mondo el Japanio, ankoraŭ ne estas esperantigitaj kaj eldonitaj.

Kian utilon alportos al vi aĉetado kaj legado de esperantaj verkoj? Da ili estas sufiĉe multaj. Antaŭ ĉio via supovo de esperanto saltem plialtiĝos. Rezulte la nombro de la individuaj membroj de UEA, la centro de la tutmonda Esperanto-movado, rimarkinde pligrandiĝos, kio konsekvence kontribuos al pligrandiĝo de la prestiĝo de esperanto en la okuloj de la monda publiko.

Do senprokraste aĉetu esperantajn librojn. Mi kiel la iniciativo de ĉi tiu ideo la unua el vi aĉetos jam hodiaŭ en la Libro-servo de la Kongresejo ne unu, sed plurajn, eble sufiĉe multajn esperantajn librojn. Por tio mi kunportis dorsosakon, jen ĉi tiel.

Mi finas. Dankon, karaj gesamideanoj, gekamaradoj kaj geamikoj el la tuta mondo!

Jiří Karen

Se eble mi ne revenus…

(Fragmentoj el leteroj kaj taglibroj el Germanio, el la tempo de la dua mondmilito.)

Magdeburg, la 18-an de decembro 1942

Kara Věra,

„panjo“, kiel bele tio sonas; tion scias nut riu, kiu ne povas tiel iun alparoli. Mia panjo vivis kun mi ĝis mia sesa jaro. Tiam mi venis al la onklino Helena, ŝia fratino. Panjo servis ĉe bienuloj. Tiutempe kaj ankaŭ nun ĝi estas neniu mielvivo. Vi skribas, ke via panjo ŝatus sendi al mi panon. Dume mi havas sufiĉe da pano. La onklino sendas al mi, ankaŭ la knaboj el lernejo. Sed estas ĉi tie multaj homoj, kiuj havas nenion. Venas al ni en la ĉambron ukrainoj, pokaze mi kontaktas ankaŭ rusajn militkaptitojn; tio sendube estas danĝera, sed eblas nenion fari. Al oni estas hontinde manĝi kaj rigardi, kiel la alia malsatas. Sed vi donos al du kaj la tria foriras kun nenio. Sekve, se vi povus por tiu celo ion sendi, vi estus afabla. Sufiĉas por ni io ajn, sed via panjo ankaŭ devas kalkuli. Mi ne scias, ĝis kiu grado vi scias la administradon de via domo. Tial vi iel interkonsentiĝu, por ke mi ne kaŭzu malfacilaĵojn. Vi volas, ke mi skribu al vi ion, kiel ni vivas ĉi tie. Kiel mi pripensas, kio ĝojigus vin, trudas sin al mia plumo versoj.

Plaŭdoj de ludkartoj, krio kaj disputo.
Rikane arbo kun folioj kverelas.
Tabloj surverŝitaj per ŝlimo.
Per malpuraĵoj surŝprucitaj vandoj kaj planko.
Moke la luno tra fendo internen rigardas.
Ĝi ekvidis min: per ŝiraĵoj de tristo mi estas vestita.
Ne lavita, ne razita. Lampoj sen ŝirmiloj.
Pedikoj, miaj amikoj, blatoj, niaj fratoj.

Per ŝvito fetoras animoj kaj korpoj.
Rido ruliĝas tra la ĉambro kiel monero rustiĝinta.
En ligno ronĝas anobio. En ŝranko umas tineo.
El angulo kun riproĉo min rigardas lernolibroj.
Ĉu arto kaj science? Ĉi tie ili estas ridindaj.

Malviva lumo de lampo (avarule ĝi kalkulas ombrojn).
Ekstere muĝas vento. Fumon ĝi resendas en fumtubon.
Al ni ankoraŭ ŝajne vivaj
frosto kaj morto proklamis mobilizon.
Plaŭdoj de ludkartoj, krio, disputo.
Ĉi tie arbo kun folioj (kaj trabo kun pordokadro) kverelas.

En la ĉambo ni estas dudek. Kaj ĉiu ulo alia figuro. Malsama eduko. Altlernejano, mezlernejano, primitivko. El urbo, el grandurbo, el periferio, el vilaĝo. Teologoj kaj ankaŭ homoj de la praga kanalizacio. Ankaŭ buĉisto, masonisto. Ili ne estas homoj bontonaj. En la vivo ili ne kutimis labori kun mortero aŭ hakilo delikate. Eble tion instruis al ili la vivo. Tial vi ne povas koleri kontraŭ ili. Ili volus labori laŭ sia metio; dume oni alligis ilin al maŝinoj. Ĝi estas meĥanika laboro, tio enuigas ilin. Ili venĝas sin mem, ili venĝas kontraŭ la vivo, unu kontraŭ la alia. Ili estas malkontentaj, sed sian malkontenton ili ne analizas, ne serĉas la kaŭzojn. Sed aliel ili estas bonaj uloj. Se temus pri io grava, eble pri la vivo, ili superus dek intelektulojn…

Praha-ek-2008-01-07

Sed mi ne vivas ĉi tie nur malgaje; ne estas ĉi tie aferoj nur tenebraj. Memkompreneble mi devas la pozitiven aferojn organizi. Tiel ekzemple ĉe laboro. Stari dek du horojn ĉe maŝino kaj fari senĉese la samon, tio estas nenio ĝojiga. Tial mi dum laboro kantas. Vi scias, ke mi kanti ne kapablas, sed tio ne gravas. En la halo estas terura bruego. Neniu aŭdas vin. Vi povas eĉ sakri. Iam-tiam mi ŝercas pri mia germano, kiu instruas min ĉe la nova frezmaŝino. Aparte agrabla estas la ŝercado pri kontrolisto. Mi venas al li kaj diras:

- Mi petas vin, mi ŝatus ion vendi al vi. Kaj malmultekoste.

Li mienas, ke ne, sed jam li ĝojas, ke li ion ricevos.

- Do, kion vi volas vendi al mi?

- Mi vendos al vi du kilogramojn da bona humoro…

Mi ne rajtas pro la monotoneco perdi la humoron. Multe mi pensas. Mia tuta pasinta vivo etendiĝas antaŭ mi,, sed ĉefe la estonta. La nuntempo kvazaŭ ne ekzistus. Mi pensas pri tio, kio en mia vivo estis bona, kion daŭrigi, kio bona ne estis, kion ĉesigi. Ĉiam mi antaŭmetas iun temon por pripenso. Konstante mi havas ĉemane paperon kaj krajonon. Mi havas multe da laboro. Sed kiam mi enfiksas stangeton, estiĝas kvarohoreto da trankvilo. Mi devas esti atentema por ne transpaŝi la punkton, post kiu okazus malagrablaĵo.. Mi skribas notojn, kiam mi havas iajn ideojn. Foje tio estas verso, foje penso. Unufoje mi paŭzas, dufoje mi ion notas. Ĉe la kamaradoj mi valoras iom kiel frenezulo. La laborestroj komence persekutis min, ke dum laboro mi ne rajtas ion skribi, sed mi parolkonvinkis ilin kaj ili dume lasis min trankvila. Ili nur fruntofrapas sin…

Antaŭ semajno ni ŝanĝis loĝejon. Ni estas en nova ĉambro. Forveturis hejmen: Brhel, Malina, Nový. Tri malbonaj spiritoj de nia ĉambro. Malicaj, arogantaj kartamantoj, kiuj lumigis ĝis maeno, sekve ni ne satdormis. Neniu kapablis konvinki ilin amike. Ili estas for. Vi ne kapablas imagi, kiel ĉio ĉi tie ŝanĝiĝis. La homoj estas esence bonaj, ili estas nur malliberigitaj de egoismo. Estas necese la bonecon el ili elfosi. Sed ĉefe vi devas scii: atenton, nun estas alia situacio, nun ni devas konformit. Ĉiu estis ĉi tie por si mem, unu kontraŭ alia. Kiam venis pakaĵo, neniu donis al alia eĉ peceton. Tial ili enviis al si reciproke, ili kvetlis. Paŝon post paŝo ni tri, Rozinka, Kuchař kaj mi, sukcesis konkeri tiun ĉi terenon. Dum hegemonio de tiuj tri viroj ni devis silenti. Neniu partianiĝus al ni. Ne inciti vespojn estis devizo de ĉiuj. Esti silentaj kaj neokulfrapaj…

Du, kiuj fuĝis kaj estis kaptitaj, revenis en la ĉambron. Kiel pun dum semajno ili ne ricevas manĝaĵon. Kiu donos al ili panon? Neniu emas al tio. Ili malsatas. Malsato estas malbona amiko. Ili priŝtelus nin nokte. Ni devus gardi ilin. Bonŝance venis paketoj, unu de via panjo. Tial informu ŝin, ke ĝi tre bone utilis al ni. Ni manĝigis ilin, sed estis kondiĉo, ke ili faros ĉiujn laborojn necesajn en la ĉambro. Pro manĝo ili estis komplezaj por ĉio. Por la ĉambro ni jam laboras ses. Kiam lakros dek, tio estos jam duono de la ĉambro. Iu bezonas cent kronojn, kompreneble en markoj. – Jen ili. – Vi perdos ilin, minacas kamaradoj. Li estas fihomo, li ne redonas, nur prunteprenas. Al multaj li ion ŝuldas. La bubo malaperis, li forveturis hejmen. Post monato venis pakaĵo kaj ankaŭ cent kronoj. Nu vidu, ne estas tiel malbone…

Estadis ĉi tie krédo. Nun, kiam mi skribas, oni iras ĉi tie piedpinte. Por karbo mi ne plu iradas. – Nur skribu, vi portis ĝin ĝissate. – Venas avizo, ke en la stacidomo estas pakaĵo. – Donu ĝin al mi, mi tien veturos, mi alportos ĝin. Ne perdu la tempon, skribu, poste vi tralegos tion al mi. Seidel forprenis ie en manĝejo nigran tabulon, en laboruji li forŝtelis kreton. Ni havas ĉi tie tabelon de servoj, ĝi estas sinoptika. Tomek al ni tri riparis ŝuojn, li estas lerta. Sufiĉis laŭdo. Nenion li volis por tio. Rodr estas bona knabo, sed li estas terure furioza; li agas senpripense. Ni iradas kun en laboron. Li havas malagrablaĵojn kun amikino. Li bezonus skribi al ŝi, ascii ŝiajn intencojn. Tial li petis min. Li pruntis al mi leteron, mi skribis por li respondon. Ion ŝi eksciis pri li, ŝi prenis tion kiel pretekston por povi rompi kun li. Li estas malfeliĉa pro tio. Estas vane ion ajn klarigi al ŝi, - Knabo, tio ne havas valoron, ŝi volas disiĝi, tio estis nur preteksto.